Sennaciulo

Oficiala organo de sennacieca asocio tutmonda

Aprilo 2000
ISSN 1163.0442

Pri la enhavo de artikoloj respondecas la aŭtoroj mem

71-a jaro, n-ro 4 (1138)
MENSUEL/MONATA

MOSKVO

La urbo de nia 73-a Kongreso



«Bolŝoj» - teatro

Ĉu vi jam aliĝis? - Ne plu hezitu !

SAT SUR TTT :http://www.multimania.com/satesperanto

SAT-ANOJ KUTIMIĜU AL EKSTERNACIA SENT-, PENS-, KAJ AGADKAPABLO! LANTI

EL LA REDAKTEJO....

Karaj gekamaradoj,
kiel vi povos konstati, ankaŭ en tiu ĉi aprila numero de Sennaciulo vi trovos diversajn kaj interesajn artikolojn. Inter ili vi legos la artikolon de k-do Charlot: «Kial mi ne iros al Moskvo». La kialo estas la milito en Ĉeĉenio. Laŭ mi persone (la redaktoro), tia motivo ne pravigas la bojkoton de nia kongreso. Niaj gekamaradoj en la OKK multege laboras por sukcesigi tiun ĉi kongreson kaj ni helpu al ili. Ni ĝuste venu amase kaj dum la kongreso, en Moskvo mem, ni per kongresa rezolucio, kondamnu tiun ĉi kaj ĉiujn aliajn militojn. Tion jam faris la membroj de la OKK dum rusa E-kongreso. Ja, dum la Sovetia periodo SAT estis konsiderata kiel malamika asocio kaj ĝi ne povis eĉ revi pri la kongreso en Moskvo. Nun ni povas kongresi tie kaj ni ne maltrafu tiun okazon. Do, mi invitas ĉiujn veni al la kongreso kaj per tio subteni la laboron de niaj gekamaradoj. Eventuala malsukceso nur provokos gravajn financajn problemojn al la OKK kaj SAT. Montru vian solidarecon al la Asocio per via persona partopreno kaj dumkongresa agado.
Via

Redaktoro

Asocia sidejo de S.A.T., administrejo kaj redaktejo: 67, avenue Gambetta, FR-75020 Paris, tel. +33.1.47.97.87.05, telekopiilo: +33.1.47.97.71.90.
Retadreso: satesper@cybercable.fr. sat@esperanto.nu
Oficejo malfermita: lunde de 9h30-15h30; de mardo ĝis vendredo: 9h30-16h30. Ekster la laborhoroj funkcias aŭtomata registrilo.
Poŝtkonto: SAT n° 1234-22 K, Paris.
Redaktas: Redakta Komitato - Y. Peyraut, P. Lévy, G. Rollin kaj K. Barkoviĉ.
Ĉefredaktoro : Krešimir Barkoviĉ
Ekspedejo de Sennaciulo: adreso de la redaktejo.
Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas. La limdato de ricevo de manuskriptoj estas la 10-a de kuranta monato.
*
Imprimé par : S.I.B., B.P. 343, FR-62205 Boulogne-sur-Mer Cedex, Francio.
Aperas monate - Mensuel.
Le directeur de la Publication: Yves PEYRAUT
Abonnement annuel/jara abono, France: 336 FRF aŭ 51,70 €
Autres pays/aliaj landoj : peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-Centro.
Dépot légal à la date de parution.

Commission Paritaire n° AS-74399
Limdato por ricevo de kontribuaĵoj estas ĉiam la 10-a en la monato.

UNUA DE MAJO 2000
en Parizo

Ni konfirmas ke membroj de diversaj Esperanto Asocioj partoprenos la sindikatistan surstratan manifestacion.
La elektita komuna slogano estas: «Les travailleurs ont besoin d'une langue universelle» (Laboristoj bezonas universalan lingvon).
Kelkaj asocioj (SAT-Amikaro, Naturamikoj, SAT-frakcio pri disdona ekonomio kaj eventuale aliaj) kunportos siajn proprajn banderolojn.

Rendevuloko : Antaŭ la kafejo «LE THERMOMETRE» en pariza Placo de Respubliko, je la 14h00.

Provincanoj kaj eksterlandanoj bonvolu rapide kontakti la SAT-sidejon por la eventuala organizado de gastigado.

VENU AL MOSKVO

Niaj gekamaradoj en Moskvo laboregas kaj preparas por ni tre allogan kaj riĉan dumkongresan programon . Jam multaj programeroj estas rezervitaj kaj ĉiu el vi trovos ion interesan. Tamen, niaj gekamaradoj iom timas, ĉar ĝis nun aliĝis tre malmultaj partoprenontoj.

Depost la Leningrada kongreso ni devis atendi 70 jarojn por povi denove kongresi en Rusio (St. Peterburgo), ĉar dum tiuj 70 jaroj SAT estis «malamika asocio». Ja, ĝi kuraĝis kritiki tiaman sovetian reĝimon.

Kvankam la aktuala reĝimo kaj ĝia politiko estas same kritikenda kaj neakceptebla, ni povas libere kongresi en Moskvo kaj tie, dum la kongreso, kritiki la mizeran staton de la granda parto de laboristaro kaj ĝenerale de la rusa popolo, kondamni la militon en Ĉeĉenio. Ni uzu tiun okazon, montru la solidarecon kun rusaj laboristoj kaj simplaj homoj, kaj subtenu la laboron de niaj rusaj kamaradoj.

En la kultura parto de la kongresa programo ĝis nun mankas nerusaj partoprenantoj. Ni invitas ĉiujn kiuj pretas prelegi pri interesaj temoj, aŭ partopreni en la distra programo, urĝe anonci sin al la OKK, kiu devas enprogramigi viajn kontribuaĵojn.
Bonvolu skribi al la prezidanto de la OKK, per normala poŝto:

Nikolao GUDSKOV, a/k 57, RU-105318 MOSKVA, Rusio.
aŭ per elektronika poŝto : **<nikolao@orc.ru>**

- Nia nova rubriko -



Redaktoro : Gerardo Rollin; 88 str. Victor Hugo; FR-37 400-AMBOISE <a.reto@france-association.com>

Ni daŭrigas ĉi-tie prezentadon de nia dua temo: « la edukado aŭ la infaneco ». Jam pluraj atestoj, levas demandojn. Sed ni volonte legus spertojn pri la nuna kreskado en la nuntempa eduksistemo. Vi verku simple, krude sen tro da cerbumado! Ni ne bezonas longajn artikolojn! (eĉ male!)

****

Jakvo daŭre priparolas sian «restadon» en la lernejo.

La punoj eĉ pli teruris. La instruisto pri la nederlanda lingvo iam batis min tiel terure, ke rompiĝis mia makzelo.

Kion mi faris? Dum mia tuta vivo mi estis bonhumora knabo, kaj dum la instruado la instruisto faris kelkajn ŝercojn. Kompreneble mi volis montri, ke pri amuzaĵoj mi superis ĉiujn. Eble li ne ŝatis tion, mi almenaŭ daŭre pensas pri tio, kaj tial li draŝis mian kapon ĝis la momento, ke mi falis kontraŭ vesthokaron, kun sekvo ĵus priskribita. Plendoj ĉe la direktoro pri la okazaĵo ne helpis, kaj nur 4 jarojn poste mi decidis forlasi la lernejon.

Antaŭ kelkaj jaroj Flandra Esperanto Ligo festis la fakton, ke ili havas la eblon instrui Esperanton jam de 25 jaroj en unu de la urbaj lernejoj. Unu el la iniciatintoj al la kurso estis la iama direktoro de mia lernejo. Kiel prezidanto de la loka klubo mi invitis lin, kaj havis la eblon paroli kun li post la festo. «Jes, li diris, mi neniam forgesis la aferon. Eble ĝi estis unu el miaj plej gravaj eraroj, kiujn mi faris dum mia kariero, sed mi jam havis tiam grandan konflikton kun la instruisto, kaj, jen via afero venis je maltaŭga momento.»

__ Kaj ĉu vi poste malkovris malavantaĝojn pro tiu malagrabla afero? La edzino de la direktoro demandis. Prezidantoj de gravaj E-kluboj, kia nia klubo estas, ne povas publike plori. Pro tio, per la kapo mi rekte petis pardonon kaj menciis ke mi urĝe devis paroli kun la sekretario de la klubo (kiu ankaŭ mi estis!.)

Jakvo

****

La atesto de Vinko ne estas tre entuziasmiga. Kvankam lia sperto ne estas mia (de alia generacio), mi bonege komprenas la sentojn de altlernejanoj, kiuj obee englutas sciojn, sen samtempa starigo de vera personeco.

Niaj eduksistemoj (almenaŭ okcidentaj) daŭre vivas sub danĝera iluzio de regula verŝado de scioj en malplenajn cerbojn. Tiu konduto kreas homojn danĝere obeemajn, sen kritikema klereco.

Mi mem estas persvadita, ke komuna diskutado de lernejanoj (ia ajn estas la aĝo!) pri **komunaj celoj por vivi kaj labori grupe** estas ĉefa solvo por instali edukan etoson. Oni kutimas nomi tion « Lerneja Kooperativo ».

kiu sukcesas, regule ricevas bonajn notojn. Li fieras, ĝojas (kaj poste dormemas). Al tiu grupo apartenas (feliĉe por li!) nia amiko Vinko. Sed miaj pensoj iris al tiuj, kiuj de la komenco ricevis malaltajn poentojn. Ili ĉiutage ricevas malbonajn notojn, regule, senbremse. Fine de la jaro ili mem estas persvaditaj, ke ili estas malkleruloj. La celo de la sistemo estas tio! Kaj ili mem kondutas tiel.
Ĉu estas mirige, se post la studado ili stultas kun amikoj, detruante ion aŭ agresante homojn? Laŭ mi ne! Ilia nura peko estis ne tuja kompreno de la regulo de la « ludo ». Kaj tiuj, kiuj ne komprenas la ludon estas la filoj de proletoj!

Prezidanto de grava E-grupo ne povas publike plori!


La scioj konstruiĝas laŭ la konstanta volo kaj inspiro de la lernanto. Se tiu lasta dormemas, la akiraĵoj estas supraĵaj aŭ danĝeraj! Bazo de edukado estu organizado de strukturita grupo por levi demandojn, petojn, dezirojn, postulojn.

La verko de Vinko pensigis min ĉefe pri la lerneja taksado. Mi mem estas instruisto, kaj mi vivas ĉirkaŭpremita de konstanta taksado de la infanoj. Tiuj geknaboj, eĉ kiam etaj, devas labori por ricevi poentojn. Tiu,

La instruistoj, kiuj batalas kontraŭ tion estas malmultnombraj, sed pli kaj pli influaj (almenaŭ en mia kolegaro!). Plie, kelkaj « zonoj » da lerneja spaco estas sentaksaj kiel ekzemple naĝado aŭ pilkumado.

Ekologia agado estus integriĝo de skigvidistoj en la Nacian Edukadon! Tiam ili taksus la skiantojn, donus ĉiutage poentojn kaj notojn. La adoltoj ofenditaj ne plu vizitus la neĝan montaron por la feliĉo de la bestoj.


Gero



***Festo de Monda Pokalo en 1998**: la junuloj bezonas identiĝon al idoloj por forgesi neadon de personeco en lernejo.*



El la Mondo




GERMANIO

Nigraj kasoj kaj brasiko

Lastatempe granda afero pri partidonacoj skuis kaj ankoraŭ ŝokas publikon en Germanio kaj eble ankaŭ aliloke. Temas pri la «Kristdemokrata» Partio, kaj, i.a., pri ties iama estro, la eksregistarestro Doktoro (plurfoje D-ro «honoris causa» = pro honoro...) Helmut KOHL. Estas latina proverbo «nomen est omen» (nomo estas destino). Ĉe S-ro D-ro Kohl tio vere trafas. La vorto Kohl germanlingve havas du signifojn. La unua estas brasiko. Fakte brasiko en germana lingvouzo denove havas du signifojn: 1e speco de legomo, 2e (en vortkombino «Kohlkopf» = brasikkapo) malplenkapulo. En la franca lingvouzo, se mi ĝuste estas informita, brasiko signifas - male al la germana - «karulo». Fakte D-ro Kohl sciis tre bone kiel enluli homojn, per sia (laŭdira) «karismo», kial homamasoj tre ŝatis kaj eĉ adoris lin. Verŝajne eĉ la socialisto, S-ro Mitterand, iama ŝtatestro de Francio, miskomprenis la nomon «brasiko» laŭ franca maniero, ĉar li - laŭdire - transdonis al D-ro Kohl tre altan sumon por subteni balotkampanjon de la konservativa «Kristdemokrata» Partio (CDU) en Germanio. Oni subrakontas, ke tiu mono venis de francia naftotrusto «Elf Aquitaine», kiu sekve povis aĉeti de la germania ŝtato la entreprenon LEUNA, heredaĵon el la likvidita Germana Demokrata Respubliko (GDR). Elf pagis por tiu tuta entrepreno, laŭdire kaduka, bankrota kaj jam ne funkciigebla, la gigantegan sumon de 1,- (unu) germana marko (= 0,51 EŬR). Al tiu entrepreno de kemia industrio apartenis ankaŭ la kompleta reto de MINOL-benzinpumpejoj en iama GDR. Evidente (?) ankaŭ tiuj ne valoris pli ol duonan eŭron. Cetere, mi mem laboris dum pli ol 20 jaroj kiel kemiteknikisto kaj profesiinstruisto en unu el la plej grandaj kaj renomaj kemifabrikejoj okcident germaniaj. Tie ankoraŭ bone kaj profitdone funkciis ne malmultaj instalaĵoj starigitaj jam en la 19a jarcento, do antaŭ 1900, longe antaŭ la fondiĝo de LEUNA!

Nun al la dua, preskaŭ forgesita signifo de la vorto «Kohl». Precipe en la svisgermana «Kohl» signifas «mensogo». «Fercel' du kĥaj kĥol» (skribita prononckonforme) signifas «ne rakontu mensogon». Ankaŭ en la ceteraj germanlingvaj regionoj (Germanio ktp.) la vorto aperas kiel radiko en «verkohlen» (prononcu «ferkolen») = trompi per mensogo.

Kio efektive okazis? Iom antaŭ la fino de la pasinta jaro (1999) diversaj gazetoj raportis pri «nigraj» (t.e. kaŝitaj, kontraŭleĝaj) kasoj kaj kontoj, de la CDU (KristanDemokrata Unio). Oni arestis iaman ĉefkasiston de tiu partio, S-ron Leisler-Kiep, sed reliberigis lin kelkajn tagojn poste kontraŭ garantipago. Leisler-Kiep diris protokole, ke li agis laŭ ordono de la partia ekssprezidanto, D-ro Kohl. Tio estigis lavangon. Ĉie ajn, en ĉiuj instancoj de la partio, oni serĉis kaj iom post iom ankaŭ malkovris novajn «nigrajn kasojn» kaj nigrajn bankkontojn, precipe en Svisio kaj Liĥtenŝtejno.



Jam en 1984 publikiĝis simila afero. Tiam temis unuavice pri la afero Flick. Post la morto de tiu sinjoro, konsiderita la plej riĉa homo en Germanio, la heredantoj klopodis eviti la heredimposton. Ŝajnas, ke ili malsukcesis ĉe la antaŭa (socialdemokrata) registaro Schmidt. Do, ili dediĉis 10-ciferan sumon (!) en germana valuto por igi la liberaldemokratan partion (FDP) forlasi la koalicion kun la socialdemokratoj. Sekve la registaro Schmidt devis demisii, kaj CDU, formante koalicion kun FDP, elektis D-ron Kohl kiel novan ĉefministron. Se la Flick-heredantoj povis pagi por tiu celo 10-ciferan sumon, oni eble povas imagi, kiom povis esti la fraŭdita imposto, kaj plie, kiom valoris la heredaĵo Flick entute. Post la (verŝajne tamen nur parta) malkovro de tiu afero la parlamento decidis eĉ pli strikte limigi la donacojn al partio. Ĉio, kio superis certan, ne tro altan sumon, devis esti publike deklarita. Tiel oni celis eviti subaĉeton. Evidente D-ro Kohl opiniis, ke tio validas nur por la aliaj partioj. Li sukcesis ĝustatempe kaŝi grandparton el la sekreta kapitalo de lia partio, por uzi ĝin jen kaj jen por partiaj celoj, kiuj ne nepre publikiĝu. Kaj oni rajtas supozi, ke dum la 16-jara regado de Kohl plu alfluis kaŝaj donacoj. Pasintjare gazetaro ekmalkaŝis tiujn manipuladojn. Kohl, kaj aliaj gvidaj funkciuloj de lia partio, «sankte» promesis fari ĉion eblan por malkovri la aferojn. Sed ŝajnas, ke ili nur volis gajni tempon por malaperigi kiom eble plej el la dosieroj kaj datenoj. Jam antaŭe oni sukcese praktikis tion. Ekzemple la dosiero pri la vendo de LEUNA al Elf Aquitaine mistere malaperis el la oficejo de la ĉefministro; oni lasis nur fotokopiojn, evidente falsitajn. Kaj ĉar ne eblis klarigi, kie restis miliono da DEM, laŭdire transdonita de armilkomercisto al la nova estro de la partio kaj la parlamenta frakcio de CDU, ĉi lasta, D-ro Schaeuble, devis demisii. Sed Kohl obstine rifuzas diri la nomojn de la sekretaj donacintoj, pretekste ke li donis «promeson de honoro» al la laŭ li «honorindaj» donacintoj. Tiu «honorpromeso» evidente pli gravas ol lia ĵuro doni sian tutan energion por la bono de la ŝtato. Oni jam suspektas, ke inter tiuj «honoraj» donacintoj estas ankaŭ anoj de la t.n. «honorinda societo», kiel la krimorganizaĵo Mafia nomas sin mem.

Malgraŭ evidento de liaj krimaj agoj, multaj el liaj adeptoj emas pretervidi ĉion ĉi, pro la gravaj laŭdiraj meritoj de D-ro Kohl, ekzemple pro la reunuiĝo de Germanio. Fakto ja estas, ke li nur malmulte influis tiun reunuiĝon. Liaj meritoj estas unuavice, ke li tro rapide allasis ekonomian kaj valutan unuiĝon, kun la sekvo, ke okcidentaj ŝarkoj grandstile povis marodi kaj tiel detrui la ekonomian prosperon en la oriento. Sed tio estas alia temo, taŭga por nova artikolo. - Nun D-ro Kohl jam denove kolektas monon. Por pagi la punon, kiun lia partio devas pagi al la parlamento. Li promesis ĉifoje publikigi la nomojn de la malavaraj novaj donacintoj savontaj la partion de bankroto. Kaj pro tiu «nobla» gesto oni jam emas pardoni liajn antaŭajn mispa-ŝojn. Laŭdire Kohl sukcesis denove kolekti jam 3 milionojn da eŭroj.

Manfred Fuehrer

K-do Walter POPPECK

- jubileulo en sindikato -



"Multaj homoj en la Renchvalo kaj speciale en ĉi tiu loka kartelo, profitis de viaj scioj, de via malegoista aktiveco kaj de via pozitiva pensmaniero". Per tiuj vortoj, Josef Braun, estro de la loka kartelo de la Germana Sindikata Unio, komencis honori la jubileulon.

La urbestro de Oberkirch, Matthias Braun, laŭde aprezis la multspecajn aktivecojn de nia kamarado Walter Poppeck, en la komunuma politiko kie li estas komunuma kaj subdistrikta konsilanto.

Li estas ankaŭ aktiva en diversaj asocioj kiel loka Esperanto-grupo, Tutmonda laborista espèrantista Asocio (SAT-Parizo) kaj en la loka grupo de la tutmonda asocio "La Naturamikoj" - Esperanto-fako. Ekde la jaro 1956, Walter estas aktiva membro de la Libera Esperanto-Asocio por germanlingvaj regionoj.

Speciale laŭdis la jubileulon la iama prezidanto de la Sindikato Kemio-Papero-Keramiko, Hermann Rappe, kiu dum dek jaroj kun Walter aktivis en la Ĝenerala Estraro de tiu ĉi sindikato.

"70 jaroj, egalas homan vivon, montras ke Poppeck apartenas al tiuj homoj, kiuj altruisme plenumas la laboron de organizaĵo"- akcentis Rappe. "Vi multege laboris por nia sindikato dum via sepdekjara membreco, kaj tiu laboro ĉiam kaŭzis ĝojon al vi. La sindikato ŝuldas grandan dankon al vi".

Fine la kolegoj Rappe kaj Stockheim, estro de la Baden-Virtemberga sindikato (Stuttgart) transdonis al la jubileulo honordokumenton kaj la honorteleron de la sindikato Minekspluatado-Kemio-Energio.

La estraro kaj membraro de la Germana Laborista Esperanto-Asocio (LEA/G) dankas al Walter - ankaŭ nome de la Sennacieca Asocio Tutmonda - por lia kunlaboro, kiu daŭru, malgraŭ lia aĝo.

Por la LEA/G-Estraro:
A.F.Stephan

TUTMONDIĜO

La temaro "Tutmondiĝo" koncernas konstante la esperantistaron, kun siaj ekonomiaj, politikaj kaj homaj implikoj. Jen, pri tiu temo, teksto aperinta en la revuo "ESPERANTO" (feb. 2000):

TUTMONDA MALEKVILIBRO

Rilate al tutmondiĝo mi trovis en la gazeto "Le Monde" (14 okt.) pripensindajn vortojn de prof. Michel Beaud, kiu verkis en 1997 la libron "Le Basculement du monde" (La sanceliĝo de la mondo) :

"La respondoj de la liberalismo kaj tutmondiĝo ne ŝajnas taŭgi por la plimulto de la homaro, ĉar tiuj ekonomie malriĉaj (4/5 de la homaro) ne povas esti helpataj nur de la ekonomia merkato. Malriĉeco pezas sur ĉio (edukado, sano, informado...). Neniam ekzistis tia malekvilibro en la nivelo de disvolviĝo kaj tia dependiĝo de la malriĉuloj. La plej riĉaj 20% de la mondloĝantaro disponas pri 86% de la riĉfontoj, kontraŭ 70 % antaŭ 30 jaroj, kaj la plej malriĉaj 20 % nur pri 1%!(...)

Krome la plej riĉaj landoj (1 miliardo da homoj) ade inventas novajn bezonojn kaj konsummanierojn por respondi al siaj problemoj de senlaboreco, dum la ceteraj 5 miliardoj, eĉ tiuj kiuj vivas per 1 dolaro tage, kroĉas sin senespere al la revo veni sur la nivelon de la riĉuloj (...).

Estonte Barato kaj Ĉinio kun siaj 2,2 miliardoj da homoj pli pezos (...) sur la mondaj decidoj. Tio implicos inventi jam nun novan ekvilibron dank'al nova sistemo de monda registaro".

Herman Deceuninck - Belgio



KOREA RESPUBLIKO
(Suda Koreio)

Estas tempo reformi la leĝon pri la nacia sekureco

En 1998, preskaŭ 400 personoj estis arestitaj pro aplikado de la Leĝo pri la nacia sekureco, inter kiuj studentoj, politikaj aktivantoj, sindikatanoj, eldonistoj, religiistoj kaj eĉ uzantoj de interreto. La plimulto el tiuj malliberuloj faris nenion, kio povus pravigi ilian arestiĝon kaj enkarceriĝon, kaj ili estis malliberigitaj nur, ĉar ili neperforte praktikis sian rajton al la libereco de esprimado kaj asociiĝo.

Prezidento Kim Dae-Jung, kiu komencis sian taskon en februaro 1998, instigis sian registaron protekti la homajn rajtojn, kaj li faris en 1998 kelkajn kuraĝigajn decidojn. En septembro 1998, li sciigis al Amnestio Internacia, ke la "malutilaj dispozicioj" de la Leĝo pri la nacia sekureco estas baldaŭ reekzamenotaj. La ministro pri la justico cetere deklaris al la organizaĵo, ke instrukcioj estas donitaj, por ke la Leĝo pri la nacia sekureco ne estu misaplikata. Intertempe centoj da aliaj personoj estis enkarcerigitaj per aplikado de tiu leĝo, kaj politikaj malliberuloj enkarcerigitaj de multaj jaroj estas daŭre malantaŭ ri-gliloj.

Amnestio Internacia opinias, ke juraj kaj instituciaj reformoj en la tereno de la homaj rajtoj nepras por la longdaŭra politika, ekonomia kaj socia disvolvado de Suda Koreio. La organizaĵo insiste petas de la sudkorea registaro, ke ĝi tuj faru decidojn por modifi la leĝon pri la nacia sekureco, por konformigi ĝin al la internaciaj normoj, aŭ ke ĝi komplete ĝin aboliciu.

(El la publika dokumento de AI de februaro 1999, esperantigita laŭ la franca traduko. Esperantigis: J. L.)

CERBA IMPULSO

«Demokratio estas papago kovrita per diverskoloraj plumoj sur la dekstra kaj la maldekstra flugiloj.»

D. Matkoviĉ

EVOLUO DE LA RILATOJ INTER ERA KAJ SAT

Post la novaĵo pri la rilatoj inter la listo de EMMA BONNINO kaj ekstremdekstraj partioj en la Eŭropa Parlamento, la PK de SAT sendis la ĉi suban leteron al Esperanto-Radikala Asocio (ERA) la 16-an de Septembro 1999.

"Karaj gekamaradoj,

Post la balotoj por la renovigo de la Eŭropa Parlamentistaro kaj ĵus antaŭ la okazigo de la SAT-Kongreso en Karlovy Vary (14-31.07.1999) atingis nin la novaĵo pri la kreado de parlamenta grupo inter la deputitoj de la Radikala Partio kaj de la franca partio de Jean-Marie LE PEN (Nacia Fronto). Tiu novaĵo konsternis nin kaj ni ne traktis, kiel antaŭvidite, la projekton de ERA por kreo de "POLITIKA PARTIO" dum la SAT-kongreso.

Dum la U.K. en Berlino, samideano GAZZOLA, delegito de ERA, asertis ke NE PLU ekzistas ia ajn rilato inter ERA kaj la Itala (transnacia) radikala Partio, kaj li konfirmis tion dum la kunveno de la Strategia Forumo.

Ni tre deziras ke vi konfirmu skribe, oficiale kaj publike tiun aserton de s-ano GAZZOLA. Se vi tion faros, ni denove povos havi normalajn rilatojn. Se vi tion ne faros, ni devos definitive ĉesi ĉiujn rilatojn inter ni, ĉar nia Asocio ne povas iel kunlabori kun organizo pli-malpli ligita al politika partio, faŝista kaj ksenofoba.

Ni atendas senpacience vian respondon.

Por la Plenum-Komitato de SAT :
Y. Peyraut kaj K. Barkoviĉ"

***

La 20-an de Decembro 1999, la SAT-sidejo ricevis longan tekston titolitan : "ERA, la italaj radikaluloj kaj la "afero" LE PEN".

Tiu teksto estas iom tro longa por ke ĝi aperu komplete en Sennaciulo, sed ni povas sendi fotokopion al tiuj kiuj deziros tion.

Komençe ERA memorigas pri la historio de la Radikala Partio kaj pri sia propra historio.

El la sekvo ni eltranĉas laŭ ni la plej signifajn partojn:

...ERA naskiĝis, citante ĝian Statuton, "por bremsi la aspektojn pli tropolurite agresemajn de la naciismoj kaj la diskriminaciajn iniciatojn de kelkaj popoloj sur aliaj", kaj agadas "utiligante demokratajn idealojn kaj ne-violentajn metodojn de la radikala kulturo".

Estas do eĉ tro klare, ke la politikaj celoj, por kiuj ERA ĉiutage batalas, reprezentas, en perspektivo, la kondiĉo "sine qua non" (absolute nepra) por la historia superado de ĉiuj formoj de naciismo (komencinte de tiuj plej ekstremistaj, kiel tiuj de Le Pen en Francio).

... Dum sia 6-a kongreso (Florenco, 20-a de junio 1998) ERA decidis tamen (sekve de kialoj, kaj formaj kaj esencaj) modifi sian statuton, ne plu devigante siajn membrojn, kiuj volus profiti de aktivaj kaj pasivaj rajtoj, esti samtempe membroj de ERA kaj de TRP.

ERA petis, tamen, jam dum tiu kongreso, kohere kaj konsekvence kun sia historio kaj siaj celoj, federacian konvencion kun TRP.

La "Listo Emma Bonino"

La "Listo Emma Bonino" naskiĝis tuj antaŭ la lastaj Eŭropaj balotoj ĉirkaŭ la politika rolantino, eksa Eŭropa Komisarino pri Homaranaj Helpoj (kaj eksa Sekretariino de TRP) ĝuste Emma Bonino.

Kvankam ĉiuj sep elektitaj deputitoj estis estraranoj de TRP (kelkaj de grava elstareco kiel la Sekretario de la Partio Olivier Dupuis, la historia gvidanto Marco Pannella kaj Emma Bonino mem), ***tute ne ekzistas formalaj kaj politikaj ligoj inter la "Listo Bonino" kaj TRP, nek - eĉ malpli - inter la "Listo Bonino" kaj ERA.***

"Mi neniel samopinias kun viaj ideoj, sed mi estas preta doni mian vivon por ke vi povu esprimiĝi", tiu estis la devizo de Voltaire kaj ĝi plene konvenas al radikaluloj, almenaŭ al tiuj esperantistaj. (Cetere , ne estis ni tiuj, kiuj voĉdonis kaj elektis Jean-Marie LE PEN).

Kvankam la PK de SAT dezirintus ke la kondamno de la agoj de la ekstremdekstraj partioj kaj de la klopodo de Emma BONINO alianciĝi - eĉ "teknike" - kun ili estu pli firma, ĝi proponas al la SAT-membraro ke re-ekzistu normalaj rilatoj inter ERA kaj SAT, surbaze de la ideoj esprimitaj en la supra teksto.

Kompreneble, ĉiamomente tiu pozicio povas esti reviziata.

La P.K. de SAT

Noto: samtempe kiam aperos ĉi tiu numero de Sennaciulo, estas sendita tiu ĉi artikolo al ERA.

** La internaj ŝtatmalamikoj kutime kaŝiĝas en malplenaj stomakoj. **
** Ventro kredas al dentoj, ne al oreloj! **
Dinko Matkoviĉ

El la SAT-sidejo

67 avenue Gambetta,

FR-75020 Paris

Tel: +33.1.47.97.87.05, Fax: +33.1.47.97.71.90

FONDUSO POR NOVA P.I.V.

Kiel vi jam estas informitaj, la laboro pri Nova PIV bone evoluas kaj ni esperas ke en la jaro 2000 ni povos eldoni ĝin.-Ĝi devus esti tute renovigita, ĝisdatigita kaj vere ilustrita, t.s. ke la ilustroj estos enkorpigitaj en la teksto mem.-
La eldonkosto de tiu nova ĉefverko de nia lingvo estos tre alta kaj pro tio ni decidis malfermi Fonduson por la eldono de tiu nova PIV.-Ĉiu esperantisto kiu deziras helpi en tiu entrepreno povas sendi monon al tiu fonduso.-La nomoj de kontribuantoj kaj sumoj regule aperos en Sennaciulo.-Se iu ne deziras ke lia/ŝia nomo aperu en tiu listo, ĝi aperos anonime.-La monon bonvolu sendi al la poŝtkonto de SAT :
n° 1234-22 K, Paris (en Francio)
n°-30041-00001-0123422K-020-39 (el eksterlando)
kun indiko "Por la Fonduso de Nova PIV".
Ni anticipe dankas al ĉiuj kontribuantoj.-

La P.K.-de SAT

Helpo al la Asocio
En Svedio (SEK) Gahlin 120,00; Levitan 90,00; Lindkvist 20,00;
En Francio (FRF) Durand 190,00; Dumoulin 30,00; Lagrange 190,00; Dejean 40,00; Barnier 30,00; Dequaire 690,00; cavalier 380,00; Cortes 30,00; Quillaud 90,00;
En Hispanio (ESP) Bustin 1000,00; De las Heras 570,00; Hill 1350,00; Holt 3200,00; Garcia Cobacho 500,00; Manau 1000,00;

NOVALIĜOJ

35.432 KOX Michael, Lensahner Str. 13, DE-24143 Kiel, Germanio
35.433 BEETS Leo, van Duystraat 180, BE-2100 Deurne, Belgio, <rete: leo.beets@pandora.be>
35.434 WESTERMAYER Manfred dr., Kandelstr. 62, DE-79194 Gundelfingen, Germanio
35.435 DE LAS HERAS JIMENEZ, Jesus Angel, Ap. 4461, ES-30080 Murcia, Hispanio
35.436 N.
35.437 *LUKAĈOVA Anna, ul. Slobody 384/8, SK-956 21 Jacovce, Slovakio
35.438 ŜPINA Ladislav, Kosmonautu 358, CZ-460 05 Liberec, Ĉeĥio
35.439 *SANAJEVA Elena, Molodjioĵnaja 5-16, RU-617055 pos. Uralskij, Permskaja obl. , Rusio
35.440 VICENTE VALERO Pablo, Obispo Quesada 14,6°D, ES-40006 Segovia, Hispanio
35.441*LINGMAN Soile, Västeråsgatan 4, SE-113 43 Stockholm, Svedio
35.442 SMIGIELSKI Stanislaw, ul. Krasickiego 12, PL-47-206 Kedzierzyn-Kozle, Pollando
35.443 TIRATAY Roger, 8 cours de la Bideaudière, FR-72700 Saint-Georges du Bois, Francio
35.444 TOYAMA Kazuhisa, Hil-koopo Hosino 204, Saitobuntyo 2, Kanagawa-ku, JP-221-0811 Yokohama, Japanio
35.445 SAITOU Yukimichi, Omori-Uenodai 27-1, JP-960-1101 Hukusima, Japanio.

NEKROLOGO

En Dietach bei Steyr (AT), la 29-an de februaro forpasis 96-jara, unu el niaj plej malnovaj membroj, k-do

Josef WIESER (matr. 14.447)

Li estis profesie barelisto kaj realiĝis al SAT en 1955 ekde kiam li seninterompe restis membro ĝis sia forpaso. Ni kondolencas al la familio de k-do Wieser.

***

En Borgerhout (Antwerpen) (BE), forpasis nia kamarado

Hendrik (Rik) DE ROOVER
(matr. 35274)

Li estis humanisto kaj vera socialisto, ekzemplo por la estontaj generacioj.
Ni kondolencas al la familianoj kaj liaj geamikoj.

PROPONO AL LA KONGRESO de Kamaradino Lilio GRANDIERE

- La Statutoj de niaj asocioj, (SAT kaj LEA-oj), laŭ la leĝo de julio 190' (franca leĝo), devas enteni en la lasta artikolo la mencion "malfondiĝo" (dissolution) de la Asocio.
Tiu artikolo ne aperas en la SAT-Statuto. Leĝe, ni nepre devas aldoni tiun artikolon al la SAT-Statuto, varme dezirante ke neniam ni bezonos uzi ĝin!
Mi proponas la suban tekston kiel lastan artikolon de la SAT-Statuto:
" Okaze de malfondiĝo de SAT, la posedaĵojn devas ricevi la diversaj LEA-oj aliĝintaj al la Gotenburga Konvencio, laŭ la nombro de iliaj membroj. "

UNESKO MANIFESTO 2000

NOTO : ni aperigas tiun manifeston, kiu jam aperis en pluraj esperantorevuoj.
Tre bona ideo! Ni subtenas ĝin. Sed, kiam oni nuligos la ŝuldojn de malriĉaj landoj?
*****

Manifesto 2000 por kulturo de paco kaj senperforto estas verkita de ricevintoj de la pacpremio Nobel cele al respondeciĝo, kiu komenciĝas je la nivelo de individuoj: ĝi ne estas alvoko aŭ peto direktata al superaj instancoj. Ĉiu homo havas la respondecon apliki al la realo la valorojn, la sintenojn, kaj la kondutojn, kiuj estas ĉe la bazo de la kulturo de paco, ĉar ĉiu povas agi por ĉi tiu celo en la kadro de sia familio, de sia loĝloko, de sia urbo, de sia lando-parto, de sia lando kaj tiel ĉiu helpos senperforton, toleron, dialogon, repaciĝon, justecon kaj solidarecon en la ĉiutaga vivo.
Manifesto 2000 estis anoncita al la publiko en Parizo la 4-an de marto 1999-a kaj ĝi estis proponata por subskribado al la publiko tra la tuta mondo. La celo pristrebata estas, ke oni prezentu cent milionojn da subskriboj ĉe la komenciĝo de la 2-a jarmilo okaze de la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj en septembro 2000-a.

Manifesto 2000 por kulturo de paco kaj senperforto

Konsciante pri mia parto de respondeco antaŭ la estonto de la homaro, kaj tute aparte de la hodiaŭaj kaj morgaŭaj infanoj, mi devigas min en mia ĉiutaga vivo, mia familio, mia laboro, mia komunumo, mia lando kaj mia loĝloko:
- respekti la vivon kaj la dignon de ĉiu homo sen diskriminacio kaj sen antaŭjuĝoj;
- praktiki aktivan senperforton, rezignante pri perforto en ĉiuj ĝiaj formoj: fizika, seksa, psikologia, ekonomia kaj socia, precipe rilate al la plej malriĉaj kaj la plej vundeblaj kiel infanoj kaj adoleskuloj;
- kundividi mian tempon kaj miajn materiajn rimedojn, praktikante malavarecon por haltigi forpuŝadon, maljustecon kaj politikan kaj ekonomian subpremon;
- defendi la esprimliberecon kaj la kulturan malsamecon, ĉiam favorante aŭskultadon kaj dialogon kaj ne cedante je fanatikeco, mensogado kaj malakcepto de aliaj homoj;
- favori respondecan konsumadon kaj evoluon, kiuj konsideras la gravecon de ĉiuj vivoformoj kaj konservas la ekvilibron de la naturaj rimedoj de nia planedo;
- kontribui al la evoluo de mia komunumo, kun plena partopreno ankaŭ de virinoj kaj kun respekto de la demokratiaj principoj, cele al kuna kreado de novaj solidarecformoj.




SLOVAKIO

NI KAJ EVOLUINTA EŬROPO

Dum cirkonstancoj, kiujn alportas nia ĉiutaga vivo kaj nevenkebla klopodo fare de niaj politikuloj enviciĝi en la familion de landoj de EK (Eŭropa Komunumo), ekzistas iu ĝis nun ne publikigita fenomeno. Ne temas pri proksimaj kaj kuraĝigaj templimoj por la eniro, sed kian reagon kaj reputacion kreas niaj senlaboraj civitanoj, kiuj laboras eksterlande en la duarangaj kaj sociale kaj sanece malŝirmitaj laborlokoj. Ili estas reprezentantoj de ni slovakoj, simile kiel estis kaj estas turkoj, kurdoj, bosnianoj, alĝerianoj, marokanoj. Niaj homoj, irantaj kaj klopodantaj ricevi nigran laboron en Svisio, Germanio, Nederlando aŭ ie ajn aliloke, diferencas de afganoj kaj hindoj nur per tio, ke ili vojaĝas trajne aŭ buse, kun validaj pasportoj kaj kiel turistoj. Ili kreas bildon pri ni kaj nian estontan pozicion kadre de EK. Kaj nun ni imagu ke nia leĝdonanto kaj parlamento agordu niajn jurajn normojn kun la europaj kaj tiel ni povu enviciĝi en eŭropajn strukturojn. Sed, kion fari en Slovakio kun ceteraj faktoroj de ĉiutaga vivo? Kion fari kun nesolvitaj amasiĝintaj problemoj en ekonomio, sanprizorgo, lernejoj? Kion fari rilate al plialtigo de vivelspezoj de plej multaj civitanoj, pri korupto, pri malbona jura disciplino kaj fine kun socia indiferenteco kaj laceco? Tio ĉi kontrastas kun evoluinta civitana konscio de homoj en eŭropaj landoj. Do, en Eŭropan Komunumon ni ne povas eniri profunde kliniĝintaj antaŭen aŭ surgenue kiel kristanoj. Tiajn tie oni ne bezonas kaj ne volas.

M. Zavodsky



Ni legis por vi....

Betty SALT (1907-1994)

LITO APUD LA FENESTRO

Betty Salt naskiĝis en Anglio sed vivis en Kalgario (Kanado), kie ŝi instruis en elementaj lernejoj. Ŝi esperantistiĝis en 1961, ĉeestis kun klasano la jubilean U.K. en Tokio, kaj aktivis en la Kanada Esperanto-Asocio. La maldika libro estis presita en 1999 en Roterdamo kaj moderne ilustrita de Fr. Weuthey. Ĝi entenas rakontojn, teatraĵojn, poemetojn, precipe pri hospitaloj, lernejoj, preĝejoj, tre diversajn laŭ karaktero. «Lito apud la fenestro» estas la titolo de la unua noveleto. Ĝi estas malfacile eltenebla (kvazaŭmurdo). Tia estas ankaŭ «Ŝi eniros la ĉielon bela» (sed kortuŝa, belanima). Aliaj tekstoj inter «Veraj rakontoj de instruistino» estas amuzaj (ekz.: «per duonoj») au priskribas infanan kaj familian psikologion («Infana kverelo»). Pluraj rakontoj parolas pri strangaĵoj. Kiam ludas nur hazardaj cirkonstancoj («La ringo»), mi persone ŝatas; same en kvazaŭpolica enigmo («Mistera malapero»): ĝi klarigas aferon vere okazintan, kies detaloj ankoraŭ kuŝas en la arkivoj de la pariza ĉefpolicejo. Sed laŭ mi, la mistikaĵoj kaj la supersentaj perceptoj («Rego David -la kvinjara avo») pli tedas ol ili mirigas aŭ konvinkas. Ne ĉiu samopiniu.
Teatraĵoj: Ĉu «La alia saĝulo» pri magia serĉado interesos tiujn kiuj konas la sanktan historion? Eble, sed koncerne la aliajn, mi dubas. Sed «Pri frua Kalgario» aŭ la tre konata legendo «Merkurio kaj la hakisto» povos ludi la lernantoj fine de la unuagrada aŭ dum duagrada kurso.
Tradukoj: Temas pri legendoj pri kristnaska vilaĝa evento, kaj pri la indianaj preriaj anemonoj (tre poezia).
Poemetoj: Mi ne tre kapablas juĝi. Ili ŝajnas al mi varitemaj, senpretendaj, belstilaj.
Konklude, tiu libro estas agrabla legaĵo, facila por progresantoj kaj por pli fortaj, kiuj ŝatas la menciitajn temojn.

A. Houlgatte



73-a Kongreso de S.A.T. en Moskvo - Rusio 15-23.07.2000

Organiza Kongresa Komitato:
Prezidanto: Nikolao GUDSKOV, a/k 57, RU-105318 Moskvo. Tel.: 00.7.095.369.42.20. (hejma), e-poŝto:<nikolao@orc.ru>
Sekretario-kasisto: Mikaelo ĈERTILOV, a/k 21, RU-143000 Moskvo-odincovo-6. tel/fakso: 00.7.095.243.74.56.
e-poŝto: <mikaelo@esperanto.nu>.

Kotiztabelo (ĉiuj prezoj en Francaj Frankoj (FRF) kaj €)


Kategorio	31.05.200	poste
SAT-membro	430 FRF/66,15€	500 FRF/76,92€
SAT-geedzoj	690 FRF/106,15€	800 FRF/123,08€
SAT-gejunuloj	215 FRF/33,08€	250 FRF/38,46€
nemembroj de SAT	530 FRF/81,54€	600 FRF/92,31€
geedzoj, SAT-nemembroj	840 FRF/129,23€	950 FRF/146,15€
gejunuloj, SAT-nemembroj	285 FRF/43,85€	330 FRF/50,77€

Rusa Ambasadejo en Parizo
40 Boulevard Lannes
75116 PARIS
telefono: 01.45.04.05.50

Konsulejo: sama adreso
telefono: 01.45.04.05.01

Infanoj (ĝis 15 j) ne pagas kotizon.

- ❑ La supre menciitaj kotizoj (kategorio A) validas por la partoprenantoj el la landoj de Eŭropo ne sube menciitaj kaj el Aŭstralio, Israelio, Japanio, Kanado, Usono, Korea Respubliko, Sudafriko.
- ❑ La partoprenantoj el CZ, HU, PL, SK, SI (kategorio B) ĝuas 40% rabaton.
- ❑ La partoprenantoj el AL, BG, RO, eksa SU, eksa YU krom SI kaj ĉiuj afrikaj, amerikaj kaj aziaj landoj krom supre menciitaj (kategorio C) ĝuas 60% rabaton.



La Granda teatro

La Granda (Bolŝoj') teatro, la ĉefa moskva muzika teatro, kie oni prezentas operojn kaj baletajn teatraĵojn, aperis en Moskvo en 1776-1780. Tamen la konstruaĵo forbrulis en 1805, kaj estis denove konstruita en 1825 (arkitekto O. Bove'). Ankaŭ tiu konstruaĵo forbrulis en 1853. La nova, ĝis nun ekzistanta konstruaĵo, estis restarigita de la arkitekto A. Kavos en 1855-56. Li ornamis ĝin per okkolona blankŝtona portiko, kiun kronas skulptaĵo de Apolono stiranta kvaron da ĉevaloj far skulptisto P. Klodt ("kvadrigo"). La ĉefa salono de la teatro (2900 sidlokoj) havas 686 kv. m., la alteco – 19,7 m., kaj estas karakterizata de elstara akustiko: de ĉiu malproksima loko estas klare aŭdebla ĉiu vorto, dirita aŭ kantita sur la scenejo. La salonoj estas lukse ornamitaj de ruĝa veluro, orumitaj modlaĵoj, freskoj. Krom spektakloj kaj koncertoj, en la teatro okazis kelkaj gravaj historiaj eventoj, kiel kongresoj ks. Ekde la fondo en 1776 ĝis nun la teatro ludis kaj ludas gravegan rolon en la establiĝo kaj evoluigo de la rusa muzika kulturo.

VIAJ REAGOJ ...

Kial ĝuste Esperanto, por kion fari?

Kun certa miro mi legis la artikolon de Kamarado Zlatko Tiŝljar, «Kial Esperanto-movadon la aliaj malakceptas?» (Sennaciulo februaro 2000): mi ne sciis, ke mi pensas, sintenas kaj kondutas, kiel tiu interesa artikolo klarigis al mi. Eble, eĉ se tiu priskribo ne respondas al objektiva realo, ĝi tamen respondas al la bildo, kiun neesperantista publiko ŝatis fabriki pri ni. Tio estas atentinda kaj pripensinda.

1 La lingvo estas ja intime ligita kun la sociaj bezonoj de komunikado kaj kompreniĝo; sed nenie mi vidas idealan socion kreitan de Esperanto aŭ alimaniere. Cetere, sen debato, mi apriore ne scias, kio estas ideala socio. Ĉu ekzistas du SAT-anoj, kiuj havas saman komprenon pri tiu absoluta koncepto? Inverse, Zamenhof iniciatis nian lingvon pro instigo de malideala socio, markita de malamo, ekskluzivo kaj perforto, en kiu la diferenco de lingvoj havas elstaran diferencigan kaj ekskluzivigan funkcion inter aliaj faktoroj. Inter tiuj ĉi estas ekzemple la malpie gentidentiga, diferenciga kaj apartiga funkcio de malsamaj religioj spite al la fakto, ke ili ĉiuj senescepte predikas universalan fratecan amon inter la homoj. Ankaŭ la klasdiferencon li almenaŭ rimarkis, celante la kreon de demokrata lingvo, pli necesa por malriĉaj malkleruloj ol por riĉaj instruitoj.

Esperanto ne povus vivi, restinte lingvo de unuopulo. La fakto, ke lingvo kreita de unuopulo ankoraŭ havas adeptojn post la morto de tiu kreinto, povas esti kuriozaĵo, sed ne estas sufiĉa motivo por lerni kaj disvastigi ĝian uzon.

«Esperanto estas la plej perfekta strukture, lingve la plej riĉa, tiel ke ĝian poezion ne eblas traduki al aliaj lingvoj ktp.»(?!?). Ĉu ekzistas du esperantistoj, du interlingvistoj, kiuj havas la saman komprenon pri perfekteco de lingvo? Ni feliĉe ne bezonas perfektan lingvon. Al ni sufiĉas oportuna, rapide lernebla kaj uzebla, stabila lingvo, precize tia, kia estas Esperanto. La kvalito de poezio dependas pli de la poeto ol de la lingvo, kaj traduko estas malfacila arto. Mi tamen ne entuziasmas pri poezio kaj alia literaturo verkitaj en stranga ĵargono farĉita per barbaraj esprimoj supoze beletraj aŭ fakaj. Kiam tiu balastita stilo invadas la komunan prozon, ekzemple en gazetoj, mi komprenas grumblojn kaj protestojn de neeŭroplingvaj esperantistoj kaj mi solidaras kun ili.

La kvalito de internacia komunikado per Esperanto estas almenaŭ dekoble pli alta, en komparebla kunteksto, ol sen Esperanto. Ni ne devas mensogi por komplezi regantajn antaŭjuĝojn aŭ profesiulan fanatikecon. La lingvoj ne estas egalaj el la vidpunkto de la lernebleco. La aliaj kvalitoj de Esperanto por internacia komunikado kaj pedagogio estas ligitaj al ĝia lernebleco kaj dependas rekte de la natura simpleco de ĝia strukturo. La noveco faras nenion en la afero: nur Esperanto estas racie kreita tiucele. Tio ne estas mirakla sed celkonscie farita. La teoria debato pri perfekteco kaj perfektigo de Esperanto estas kaduka jam de la fino de la deknaŭa jarcento. Mi eĉ ne komprenas, kiel mi povus esti esperantisto sen tiu nepra konstato.

2 La internacia praktiko de Esperanto kreis al ĝi propran kulturon, literaturon, komunumon. Tiu literaturo estas ne supera, sed komparebla kun intereso al aliaj literaturoj, kun kiuj ĝi ne konkurencas sed kunlaboras. La propra kulturo de SAT resumiĝas en ĝia devizo: «SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens-, kaj agadkapablo». Tio havas nenion komunan kun la funkciado de sektoj. Manifestiĝoj de sektismo en nia Asocio kontraŭas ĝiajn statuton, tradicion kaj spiriton.

3 Esperantistoj havas multajn bonajn motivojn estimi kaj ŝati la anglan lingvon. Interalie, la angla estas unu el la lingvoj de nia Fundamento. Plej grava motivo tamen estas nia frateca amikeco por anglalingvanoj, kiuj estas inter ni. Ilia gepatra lingvo estas nek pli, nek malpli respektinda ol ĉiu ajn alia. En SAT, Esperanto ne estas celo en si. Ĝi nur simple estas nia sola oficiala komuna lingvo. Ĝian rolon bone difinas la vorto «Sennacieca», kiu figuras en la nomo de nia Asocio.

4 Oni ne povas diri, ke la slogano: «Esperanto fariĝu la dua lingvo por ĉiuj apud la nacia», prava aŭ malprava, apartenas al la tradicio de SAT. Precipe, Lanti kaj liaj aprobantoj tiris la logikan konsekvencon de tiu slogano kaj anticipis, ke Esperanto estu la ĉefa lingvo almenaŭ inter membroj de SAT. Tamen, la slogano povas esti alimaniere komprenata. Nome: dua lingvo estas duaranga lingvo, kiun oni nepre ne uzu, se oni povas uzi la unuan. Tiel komprenata, la «dua» lingvo fariĝas la lasta lingvo por ĉiuj, la lingvo, kiun nepre neniu uzu, se oni povas uzi alian. Ne uzi duan lingvon ankaŭ signifas ne ekzerci sin en ĝi kaj eĉ forgesi ĉion lernitan dum malmultaj kursaj horoj. Neesperantistoj, precipe instruitoj, kiuj kun fiera elitosento scias, kiom da vera penado postulas vera lernado, povas ironie observi tiujn strangajn esperantistojn, kiuj pretendas propagandi facilan lingvon, kiun ili mem apenaŭ kapablas balbuti eĉ en okazo de absoluta neceso. Tio konfirmas la elitisman iluzion, ke nur tio valoras studon, kio estas malsimpla, malracia kaj malfacila.

Sendepende de sloganoj, des pli utila estas lingvo, ju pli bone oni scipovas ĝin. Esperanto ne povus servi kiel helpa lingvo, se ĝi ne fariĝus unue la intima lingvo de multaj homoj. La propaganda efikeco de sloganoj estas dubinda, ĉar ne utilas logi kaj kapti blindigitajn adeptojn. SAT kaj la laborista esperantismo bezonas memstaremajn celkonsciajn uzantojn de Esperanto.

Respektindaj estas la aspiroj de sinceraj homoj, kiujn en la aliĝo al Eŭropa Komunumo logas perspektivo de definitiva paco, amikeco kaj solidara prospero, sed mi ne proponas Esperanton kiel identeclingvon de Eŭropo, kiel lingvon de eŭronaciismo.

Eŭropa Komunumo, difinita ne de solidaraj popolaj aspiroj kaj bonintencaj, eĉ oficialaj deklaroj sed de Mastriĥta traktato, jam havas sufiĉan identecon: ĝi estas tiu de la Centra Banko en Frankfurto, sendependa de ĉia demokrata povo sed satelito de tutmonda spekulacia merkato. Ĝiaj ĉefaj kulturaj trajtoj estas la «malfermita merkatekonomio, en kiu la konkurenco estas libera» kaj la obsedo pri la redukto de la tiel nomata prezo de la laboro (salajroj ktp). Tiu maldemokrata Eŭropo de sociale malkompetentaj financistoj kaj bankestroj konfuzas individuan liberecon kun la rajto de tiel nomataj investistoj senlime ekspluati homojn, kaj publikajn servojn kun privataj monopoloj.

Okazas ne nur obstina rezisto de tiuj medioj al ĉia sociala progreso, sed konstantaj, senlacaj, laŭbezone ruzaj aŭ perfortaj atakoj kontraŭ ĉiuj rajtoj kaj sociala protektado de la salajruloj kaj iliaj familioj. Al tio aldoniĝas sistema rabado kontraŭ sendependaj malgrandaj kaj mezgrandaj entreprenoj, kiuj estas trudataj vasaliĝi aŭ malaperi. Tio ne estas komploto, sed tutmonda strategio de superreganta klaso, kun krimaj aspektoj. Ne temas ĉi tie nur pri klare malleĝaj fenomenoj, kiel estas la recikligo de krime akirita mono, sed ankaŭ pri la fakto, ke la ŝtatoj, demokrataj aŭ ne, jam de longe abdikis pri sia respondeco rilate al la kreado de mono, profite al privataj komercaj bankoj. Tiuj ĉi uzas tiun povon por plenleĝe prirabadi ĉiujn popolojn ne nur tra la buĝeto de iliaj ŝtatoj sed ankaŭ rekte el iliaj monujoj.

Kroĉi la esperantistan vagonon al tiu fifriponeca vagonaro ne estas konsilinde; sed la disvastigo de Esperanto tre utilus por kontribui al la batalo kontraŭ ĝin,

al la konstruo de demokrata Eŭropo surbaze de tutmonda ne nur kriple teoria, sed plene efektiva respekto al la homaj rajtoj, paco kaj socia progreso, solidaro kun la tuta homaro, respekto al la natura medio kaj al la homa sano.

5 Uzeblas Esperanto inter aliaj rimedoj por akcele kontribui al la urĝa kreo, feliĉe jam komencita, de tutmonda supertendenca civitana konscio kaj sindefendokapablo. En tiu necesa mondskala agado, kiu ne koncernas nur striktasence diritajn laboristojn, anglalingvaj usonanoj kaj kanadanoj aktuale ne lastavice partoprenas, kiel ni vidis okaze de la batalo kontraŭ la MAI, kaj pli malfrue en Seattle. Usonaj civitanoj donas interesan ekzemplon pri batalo kontraŭ malpurigo je la maro. Batali kontraŭ ilia lingvo estus erari pri batalcelo.

Ĉiu lingvo plenrajte apartenas al tiuj, kiuj scipovas ĝin. Ĝi estas per si mem neŭtrala kaj uzebla por kiu ajn celo. SAT ne pretendas ekskluzivan posedrajton pri Esperanto, sed uzas ĝin por statute difinita celo, kiel principe ĝi samcele uzus alian samefikan lingvon, kiu fakte ne ekzistas.

Petro Levi 23111

Kial mi ne iros al Moskvo?

Mi pagis mian aliĝkotizon por la Moskva kongreso de SAT. Mi jam ĝojis retrovi kamaradojn kiel Nikolaon Gudskov aŭ Vladimiron Bespalov.

Kaj alvenis Ĉeĉenio. Komence de tiu remilito, mi pensis en mi mem, ke ja temas pri «interna afero» de Rusio, ke Rusio batalas kontraŭ islamistoj, por sia nacia integreco ktp...

Sed rapide mi komprenis, ke temas nun pri eksterma milito, kontraŭ popolo jam frapita sub Stalin, pli kaj pli vera genocido far la rusa armeo, registaro kaj portempa Prezidento kaj Kandidato Vladimir Putin.

Mi aparte fieras esti ano de Franca Komunista Partio, kies Nacia Sekretario Robert Hue sendis leteron al S-ro Zjuganov por klarigi kial FKP ne invitos Komunistan Partion de Rusa Federacio al nacia kongreso baldaŭ okazonta pro apogo al ĉeĉenia milito, alianco kun naciismaj fortoj kaj kontraŭsemidaj diraĵoj de gravuloj de KP de RF.

Iu eble obĵetos al mi, ke mi per mia neveno punos nekulpantojn, organizontojn de la Moskva Kongreso, kaj ankaŭ SAT.

Fakte, mi kontestas tion kaj klarigas.

Kvankam mi ĵus eksciis pri la kuraĝa kaj gratulinda sinteno de OKK-anoj, kiuj prezentis malfeliĉe ne adoptitan rezolucion por kondamni la militon en Ĉeĉenio en kongreso de REU, mi pensas, ke ne eblas nun kunveni en Moskvo, kie pli kaj pli da minacoj kontraŭ demokratio kaj liberecoj amasiĝas.

Sed estas pli. Dum «Sennaciulo» senĉese kaj konstante publikigas artikolojn kontraŭ la krimoj de «la komunistoj» (ekzemple lastatempe en Jugoslavio inter 1945 - 1947, aŭ en Ĉeĥoslovakio en 1950 - 1954), ĝi aperigis nenion kontraŭ tiu nuntempa abomena Ĉeĉenia genocido aŭ pri Aŭstrio. Aliflanke de tre kaj tro longe, «Sennaciulo» alkutimigis nin apogi naciismon kontraŭ alia naciismo (ekzemple la kroatan kontraŭ la serba).

La Plenumkomitato de SAT kulpas pro sia nenionfarado pri tio. Nenion farante nek dirante, SAT kunkulpus kun la buĉistoj aŭ faŝistemuloj pro sia silento.

Vincent CHARLOT

Noto de la P.K. :
Ni iom miras pri la klarigoj de k-do V. Charlot.

1. - Sennaciulo aperigis nenion pri la abomena genocido en Ĉeĉenio (ĉu ekzistas neabomena genocido?). Tio estas vera. Ĵurnalistoj kalkulis ke de la 2-a mondmilito okazas samtempe konstante 15 lokaj militoj sur la tuta terglobo. Kaj Sennaciulo ne aperigis tekstojn pri ĉiuj, sed aperigas tekstojn kiujn sendas kontribuantoj. Kial k-do Vincent Charlot ne verkis artikolon pri la milito en Ĉeĉenio, kiel tion faris Nikolao Gudskov (vd. martan numeron de Sennaciulo) ?

2. Kial «Sennaciulo senĉese kaj konstante publikigas artikolojn kontraŭ la krimoj de «la komunistoj»? Tutsimple, ĉar la kontribuantoj sendas artikolojn pri tiu temo.

3. La PK de SAT kaj la redaktoro de Sennaciulo ŝatus ke k-do V. Charlot indiku en kiuj numeroj de Sennaciulo aperis tekstoj kiuj «alkutimigis nin apogi naciismon kontraŭ alia naciismo».

La P.K. de SAT

Ree Tiŝljar

Jes, nia movado ege malbezonas finvenkistojn kaj aliajn kiuj diras ke nia lingvo estas perfekta, aŭ ke per ĝi eblas esprimi ĉiujn sentojn, pensojn kaj nuancojn. Ekzistas ankoraŭ multe da aferoj kiuj ne jam estas esprimeblaj per esperanto kaj ekzakte tial oni ne timu ke ĝi formanĝas regionajn/etnajn lingvojn.

Mi ne favoras esperanton kiel eŭropan identeclingvon—mi preferus enkondukon de ne-eŭropaj elementoj en ĝi ĉar ĝi jam estas tro eŭropa

Ŝanĝi SAT-on al maldekstra alo de la esperantistaro ŝajnas al mi bona ideo. Kiam mi unuafoje aŭdis pri SAT mi havis la impreson ke ĝi estis la frakcio kiu volas ke esperanto estu la sola kulturlingvo de nia planedo— do koloniistoj..

Ronaldo NOBEL' 34318

Ĉu ni ne estas jam en la 21-a jarcento kaj en la 2-a jarmilo?

En Sennaciulo de decembro 1999 kaj januaro 2000 la PK kaj redakcio prezentis al ni siajn bondezirojn por la nova jaro. Ili estu dankataj pro tio, sed io tiklis min. Mi konstatis ke ili konsideras la jaron 2000 kiel la lasta jaro de la 20-a jarcento. Laŭ mi tiu 20-a jarcento finiĝis la 31-an de decembro 1999.
Tio valoras por la Kristana kalendaro, verŝajne la plej uzata ĉe nia membraro, sed ne la sola. Ĝi baziĝas sur la supozata naskiĝdato de Jesuo. Tiu dato korespondas al la jaro 749 de la romia erao.
Kiel ĉiuj infanoj, Jesuo naskiĝis je la punkto nulo de sia aĝo. Poste li iĝis unutaga, unumonata, unujara. Ŝajnas logike pensi ke lia unujariĝo korespondas al tiu de lia erao.
Alidirite, li naskiĝis je la fino de la 1-a jaro antaŭ Kristo kaj je la komenco de la 1-a jaro post Kristo.
Ni imagu okazaĵon daŭrinta 2 jarojn inter la jaro 748 kaj 750 de la romia erao.
Koncerne la kristanan eraon tio povus nur esti datita de la jaro:minus unu ĝis la jaro : plus unu.
Do, laŭ mi ni estas nun en la 21-a jarcento kaj en la 3-a jarmilo.

M. Hardy

NDLR: la redakcio restas pri siaj bondeziroj. Ne tro gravas finfine, ĉar la diversaj kalendaroj diferenciĝas. Sed eĉ en Esperanto estas klare ke jarcento = cent jaroj, jarmilo = mil jaroj. Do 20-a jarcento finiĝas per 20x100 = 2000 kaj 2-a jarmilo per 2x1000 = 2000. Sekve, la 21-a jarcento kaj la tria jarmilo komenciĝos post la fino de tiu ĉi jaro.

KONTRIBUO POR VASTIGI LA UZON DE ESPERANTO

Perfekta ponto por traduko de iu ajn al alia lingvo pere de la denaskaj lingvoj de du tradukantoj, Esperanto transdonas fidele la penson de la aŭtoro kaj ebenigas multajn obstaklojn kiel oftaj netradukeblaj esprimoj.

Responde al miloj da esperantistoj, kiuj depost unu jarcento demandas sin kiel disvolvi nian lingvon, mi proponas kaj profunde kredas je simpla solvo kiu trankvile kuŝas antaŭ nia pordo. Tradukreto "ITRE" jam ekzistas, sed ĝi ne estas sufiĉe konata de la esperantistaro. Ni scias ke multe da volontuloj pretas helpi al starigo de granda tutmonda tradukreto, tasko vasta kaj ne facila, sed kiel fruktodona se ni volas ekkonscii pri la atingeblaj konsekvencoj!

Pri tiu projekto oni ofte ricevas respondon de esperantistoj komparelan al tiu de publiko rilate al Esperanto, en kiu estas dubemo, malemo al intelekta pristudo de la propono kaj fine neevitebla konkludo: "vi ne konscias pri la teknikaj malfacilaĵoj de tiu tasko".

Jes, la administraj, organizaj kaj teknikaj malfacilaĵoj gravas sed ili estas venkeblaj. Male, la lingvaj malfacilaĵoj konkretigas precize la avantaĝojn de Esperanto!

La celo :

-1. Instigi la cirkuladon de milionoj da dokumentoj en Esperanto
2. Proponi tradukpostenojn al junuloj kapablaj traduki post la finlerno de Esperanto.

Unuaj sugestoj :

Malfermo laŭ la bezonoj, de informa rubriko en la revuoj "ESPERANTO", "SENNACIULO" kaj "HEROLDO" - almenaŭ dum la unuaj jaroj.

Ekstarigi landajn asociojn kies rolo estus unue formi tradukantojn, poste tradukistojn, kapablaj perfekte traduki el nacia lingvo al Esperanto kaj inverse. Tiu kondiĉo estas nepre necesa antaŭ la starigo de komerca tradukorganizo.

Finance helpi la eldonon de la nova PIV kaj espereble de teknikaj vortaroj rilate al ĉiuj profesioj.

Pri la propono :

Kvankam nia celo ne estis perfektiĝo en tradukarto, ni povas aserti ke tia intelekta laboro forte altigus la ĝeneralan lingvan nivelon. Nia celo ne estas perfektiĝo en tradukarto, sed kontribuo al triumfo de Esperanto (la unua tamen forte helpos la duan).

La lastaj centjaroj, kiam la tuta energio de esperantistaro nur permesis firme elteni la ekziston de Esperanto, klare montras ke la efiko de nia idealismo ne estas komparebla al ĉiutaga uzo de Esperanto en komercaj kaj industriaj aktivecoj. Tia uzo kreus milojn da postenoj ĉefe por junaj senlaboraj gestudentoj. Pri la sukceso ni ne dubu. Ni konscias ke la konkurenco ankaŭ ekzistas en tradukaktiveco kiel en ĉiuj aliaj fakoj, sed la klientoj ĉiam elektos la plej bonan solvon laŭ la komparo: kvalito-prezo, kia ajn estas la uzata metodo.

Ĉu ni scias kiom da junuloj ne konsentis lerni Esperanton pro maloftaj okazoj ĝin uzi ĉiutage? Ni travivas unikan momenton dum kiu la tuta mondo ekkomunikas inter si kvazaŭ granda vilaĝo. La lingvaj baroj nepre devos fali. Ni ne scias kiu lingvo triumfos, sed ni povas aserti ke la oportuno por Esperanto estas nun aŭ neniam. Kia ajn estu la metodo, ni ne rajtas maltrafi la okazon.

Pesimisto povas aserti ke la entrepreno fiaskos dum optimisto povas pruvi ke ĝia merkato atingos la komercan ciferon de grava industrio. Kiu scias?

La demando estas nun, ĉu sufiĉe granda nombro da volontuloj pretas partopreni, komence kiel tradukantoj por kelkaj, poste tradukistoj por ĉiuj? Ni ne scias kiom da tempo estos necesa por starigi la entreprenon. Ĝia sukceso necesigas altkvalitan organizadon, pri kiu ni ne rajtas erari. La asocioj verŝajne transformiĝos je tradukfirmaoj. Niaj kontaktoj montris ke neatendita proporcio de tradukfirmaoj ne fermas sian pordon al uzo de Esperanto tutsimple, ĉar tio povas malaltigi la kostojn, kaj altigi la kvaliton de la traduklaboroj.

Ĉe tiuj firmaoj, niaj komencantoj fariĝos traduksperuloj, kaj ...ĉu la starigo de novaj firmaoj ne ĉiam dependas de spertuloj?

Tradukfirmestro kiu deziris juĝi Esperanton "ĉe la murpiedo" ofte renkontas netradukeblajn esprimojn aŭ tekstfragmentojn pro nescio aŭ neekzisto de simila esprimo en la alia lingvo.

Tiu profesiulo pretis akcepti senhezite Esperanton kiel helpan tradukmetodon. Ĉu tio ne estas kuraĝiga? Miaj profesiaj kontaktoj en la konstruo de maŝinoj por la nutraĵindustrio, persvadis min ke la uzo de la angla lingvo neniam kapablos respondi perfekte tutmonde. Esperanto, siaflanke, bezonas sin "froti" al la konstanta evoluo de teknikaj vortoj. Unu el la roloj de la reto estos kontribui al la verko de teknikaj vortaroj.

Rimarko al dubemuloj kaj puraj idealistoj

Simpatia kantisto deklaris dum la UK en Montpeliero : «Esperanto restos la lingvo de amo kaj frateco dum la angla fariĝos la lingvo por komerco kaj monaferoj».

Tio simple signifas mortkondamnon por Esperanto. Lingvo nur por bonintenculoj estas dolĉa revo. Kvankam idealisto, mi konvinkiĝis ke se la uzo de Esperanto ne kun-portas monprofiton, kaj ne permesas vivperlabori, ĝi lamos dum dua jarcento kaj finfine fariĝos agrabla temo por estontaj historiistoj.

Pri la "tradukarto"

Korekta tradukado estas absolute necesa por la sukceso de la entrepreno. Ĝi konsciigas nin pri niaj lingvaj mankoj kaj naskas fortan deziron al memperfektiĝo. Ĉu niaj pesimistaj samideanoj akceptas tiun nuran argumenton kiel pravigilon de tradukreto-starigo? (Kiel malbona praktikanto de Esperanto mi devas konfesi, ke pro manko de esprimkapablo mi ofte sentas min stulta).

La komuna lingvo de ambaŭ tradukantoj permesas aldoni piede de la ponta teksto tiom da komentarioj kiom necese por perfekte respeguli la penson de la aŭtoro aŭ reliefigi iun gravan punkton. Reputacio de kvalito estu la unua reklamargumento de la reto, parole transdonata de kliento al kliento. Ĝi estos ankaŭ la plej malmultekosta.

Revo: Se iun miraklan matenon kelkaj ŝtatestroj decidus akcepti Esperanton en la lernejprogramojn, ĉu niaj organizoj povus respondi : "finpretaj"?

Claude Bodson